

19a ORDINARA DIMANĈO – A 13an de aŭgusto 2017

ORDONU, KE MI VENU AL VI SUR LA AKVO

Kmento al la evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 14, 22-33

Post kiam la popolamaso manĝis ĝissate, Jesuo ordonis al siaj disĉiploj, ke ili iru en la ŝipeton kaj transiru antaŭ Li al la alia bordo, dum Li forsendos la amason. Forsendinte ĝin, Li sola supreniris la monton por preĝi. Kiam vesperiĝis, Li estis ankoraŭ tie.

La ŝipeto jam estis multajn stadiojn malproksime de la bordo, turmentate de la ondoj, ĉar la vento estis kontraŭa. Ĉirkaŭ la fino de la nokto Li iris al ili paŝante sur la ondoj. La disĉiploj, vidante Lin iranta sur la lago, maltrankviliĝis kaj diris: „Tiu estas fantomo!” Kaj pro timo ili ekkriis. Sed tuj Jesuo diris al ili: „Trankviliĝu: estas Mi; ne timu.” Tiam Petro diris: „Sinjoro, se estas Vi, ordonu, ke mi venu al Vi sur la akvo.” Kaj Li diris: „Venu!” Petro, malsuprenirinte el la ŝipeto ekpaŝis sur la akvo, kaj iris al Jesuo. Sed vidante la fortegan venton li ektimis. Kaj komencante subakviĝi, li ekkriis: „Sinjoro, savu min!” Tuj Jesuo etendis la manon, kaj kaptis lin, dirante: „Ho malgrandfidulo, kial vi dubis?” Post kiam ili supreniris en la ŝipeton, la vento ĉesis. Tiuj, kiuj estis en la ŝipeto, adorkliniĝis al Li, dirante: „Vere Vi estas Filo de Dio!”

La universala amo de Dio por la tuta homaro, kiun Jesuo venis manifesti per sia vivo kaj sia mesaĝo, trovas reziston ĝuste en la grupo de la disĉiploj, kiuj ne akceptas, ke la amo de Dio estas por la tuta homaro, inkluzive de paganoj; ili opinias, ke la privilegio apartenas al Izraelo.

Tion skribas al ni Mateo en sia evangelio, ĉe ĉapitro 14, ekde versiklo 22: “Post kiam”, tiu “post kiam” estas en rilato kun la kundivido de panoj kaj fiŝoj en lando Izraela, “ordonis”, laŭvorte “devigis”, kial Jesuo devigas siajn disĉiplojn? Ĉar Li kontraŭas ilian reziston, ili volas scii nenion pri tio, Li devas ordoni, kaj ordoni kion? “al siaj disĉiploj, ke ili iru en la ŝipeton”, la ŝipeto estas la bildo de la kristana komunumo kaj do de la Eklezio, “kaj transiru antaŭ Li”, jen, nun ni komprenas la kialon de la rezisto, “al la alia bordo”. Kiam, en la evangelio, ni trovas ĉi tiun esprimon, “la alia bordo” indikas ĉiam la orientan

bordon de la lago de Galileo, nome, la paganan landon. La disĉiploj havas nenian intencon iri en paganan landon, kaj, ĉiufoje kiam Jesuo invitas aŭ puŝas ilin iri en paganan landon, ĉiam okazas incidento, "dum Li forsendos la amason. Forsendinte ĝin, Li supreniris la monton ", la monto havas la difinan artikolon, kaj ĝi indikas la monton, kiu aperis pli frue, nome la monton de la feliĉproklamoj, kie Jesuo anoncis ĉi tiun mesaĝon de universala amo, "sola" (laŭvorte "aparte", ĉi tiun esprimon la evangeliistoj utiligas por indiki, ke estas rezisto, kontraŭstaro aŭ nekomprene fare de la disĉiploj) "por preĝi.", estas la unua fojo, ke Jesuo preĝas, dufoje Jesuo preĝas en ĉi tiu evangelio, kaj ĉiam en situacioj de malfacilo kaj de danĝero por siaj disĉiploj, ĉi tie kaj en Getsemano.

"Kiam vesperiĝis,", estas strange, ke la evangeliisto ripetas tion, kion li diris kelkajn versiklojn pli frue, ĉe versiklo 15, kial li faras tion? "Kiam vesperiĝis" estas la sama esprimo de la lasta vespermanĝo de Jesuo; do ĉi tiu universala amo estas tiu, kiun Jesuo manifestis per la fordonado de si mem por la tuta homaro. "Li estis ankoraŭ tie" (laŭvorte, "sola"), nu, estas sciate, ke li estas sola: la disĉiploj forestas, la homamaso estis forsendita, sed la evangeliisto substrekas solecon ne nur fizikan, sed spiritan de Jesuo, la disĉiploj akompanas, sed ne sekvas Lin.

"La ŝipeto jam estis multajn stadiojn malproksime de la bordo, turmentate de la ondoj, ĉar la vento estis kontraŭa.", ĉi tiu vento estas la rezisto de la disĉiploj al la invito de Jesuo iri en paganan landon, ili ne akceptas, tute ne akceptas porti ĉi tiun universalan amon al pagana lando, kie Jesuo poste denove kundividis la panojn, ili opinias, ke tio estu kaj restu privilegio de Izraelo. Jen kial la vento estis kontraŭa, temas pri la disĉiploj mem.

"Ĉirkaŭ la fino de la nokto", la detalo resendas al psalmo 46, kie estas indikite, ke Dio sukuras je tagiĝo, " Li iris al ili paŝante sur la ondoj " (laŭvorte, "sur la maro"). Kial la evangeliisto skribas al ni, ke Jesuo paŝas sur la maro? La maro estis la bildo de kaoso, kiun nur Dio povis bridi; en la libro de Ijob, Dio paŝas sur la ondoj de la maro. Tiam paŝi sur la maro indikas la manifestiĝon de la dia kondiĉo, de la pleneco de la dia kondiĉo, fare de Jesuo. "La disĉiploj, vidante Lin iranta sur la lago,", do vidante la dian kondiĉon, "maltrankviliĝis", kial ili maltrankviliĝis? Ĉar la religio estis fosinta abismon inter Dio, malproksima, neatingebla, kaj la homo; estis ne pensebla, ne imagebla, ke Dio povas manifestiĝi en iu homo, kaj ke iu homo povas havi la dian kondiĉon, tial "kaj diris: „Tiu estas fantomo!" , do laŭ ili ne eblas, ke homo povas esti ankaŭ Dio, "Kaj pro timo ili ekkriis.. Sed tuj Jesuo diris al ili: „Trankviliĝu: estas Mi", Jesuo per ĉi tiu esprimo - la respondo, kiun Dio donis al Moseo en la fama epizodo de la brulanta arbeto, depostulas la plenecon de la dia kondiĉo, "estas Mi; ne timu."

"Petro", ĉi tiu disĉiplo estas prezentita per la nura malpozitiva kromnomo, kiu indikas lian obstinon, lian malmolkapecon, do tio komprenigas, ke li estas faranta ion en malakordo kun Jesuo, "tiam diris: „Sinjoro, se estas Vi,", jen precize kiel la diablo en la dezerto: "se estas vi", Petro ludas la rolon de tentanta satano, kiel pravas la fakto, ke pli poste Jesuo lin riproĉos nomante lin ĝuste satano, "se estas Vi, ordonu, ke mi venu al Vi sur la akvo": Petro volas

ankaŭ li la dian kondiĉon. "Kaj Li diris: «Venu!»", la dia kondiĉo ne estas ekskluziva apartaĵo de Jesuo, ĝi estas je dispono de ĉiuj, kiuj ĝin akceptas.

"Petro, malsuprenirinte el la ŝipeto ekpaŝis sur la akvo, kaj iris al Jesuo. Sed vidante la fortegan venton li ektimis. Kaj komencante subakviĝi," kial la evangeliisto diras al ni ĉi tiun esprimon? Jesuo, ĝuste je la fino de la surmonta prediko, kie li estis anoncinta ĉi tiun universalan amon de Dio al la homaro, estis parolinta pri iu domo konstruita sur sablo; kiam alvenis impetaj ventoj kaj akvoj, la domo disfalis, ĉar la vortoj ne estis enradikiĝintaj en la persono: jen, ĉi tiu estas la bildo de Petro, jen kial li subakviĝas, "li ekkriis: „Sinjoro, savu min!". Tuj Jesuo etendis la manon, kaj kaptis lin," estas interese, ke Jesuo estis vokinta Simonon, invitante lin esti kaptisto de homoj, kaj kontraŭe estas li tiu, kiu devas esti kaptita, "dirante: „Ho malgrandfidulo" , duafoje Jesuo devas riproĉi pro la manko de fido, "kial vi dubis?", li opiniis, ke la dia kondiĉo venas pro dia ordono, dum la dian kondiĉon oni atingas nur pere de la persekuto, la kontraŭstaro kaj ofte la forofero de sia vivo.

"Post kiam ili supreniris en la ŝipeton, la vento ĉesis.", ĉi tiu kontraŭa spirito, tuj kiam la komunumo akceptas denove Jesuon, ĉesas. "Tiu, kiuj estis en la ŝipeto, adorkliniĝis", ni retrovos ĉi tiun verbon sur la monto de la releviĝo, kiu estas la sama monto de la feliĉoj, kie la disĉiploj renkontas la releviĝinton, "adorkliniĝis al Li, dirante: „Vere Vi estas", kaj jen la novaĵo, "Filo de Dio!". Ili ne diras "la filo de Dio"; la filo de Dio indikis la tradician Dion, tiun, kiu ekstermadis la pekulojn, kiu abomenis la paganojn; Jesuo estas filo de Dio, iu tute nova maniero manifesti Dion kaj lian filecon, kiu estas tiu de universala amo de kiu neniuj povas esti ekskludita.